It was a bold decision of the Local Committee to take industrial history and the influence of immigrants as the congress theme; but the experiment was successful. Lectures were of the highest standard and contributed to a real understanding of the theme. They included: an overview from the President; Mia Casey on the Economic Geography of Lanarkshire; Jack Casey on Keir Hardie, the founder of the Labour Party who was born in Motherwell; David Kelso (Director of the Esperanto Association of Britain) on the Italian Contribution; and Don Lord with a hilarious lecture (as light relief) about Amusing Encounters in the Esperanto World.

It was a particular pleasure that Princo Henriko from Nigeria also attended and had the opportunity to lecture about society and Esperanto in his land. Nigeria is buzzing with Esperanto activity in spite of the turbulence of recent years.

The excursions to the local heritage centre, an industrial museum, Carfin Pilgrimage Centre and the Clyde Valley also helped to add further relevant dimensions and were more than pleasant interludes.

The entertainment included a strong Irish element, and singing and accordion music from Elena and

Alexander Danko from Russia. Some meals also took place outside the Bentley in Italian and Chinese restaurants to emphasise the strong internationalism of a town which is not a normal tourist destination.

The Scottish committee met twice and chose Duncan Thomson as Vice President, and Glasgow as the Congress city for 2003 when the societies in Glasgow and Edinburgh will celebrate their centenaries.

Books were sold; friendships were made or reinforced; town walks were conducted; the Bentley bar was patronised; and Esperanto and factual knowledge were advanced informally but effectively.

Thanks are due to retiring President Charlie Dorman for choosing the theme and chairing most meeting; Jean Bisset for supreme administrative competence; and Mia Casey for financial skills.

The Scottish Esperanto Association is proud that its now has a President, Dr. Chris Gledhill, and Vice President, Duncan Thomson, who both belong to the younger generation of Scottish Esperantists!

DAVID W. BISSET

ESPERANTO:

THE AGGRESSOR LANGUAGE

Yes, it is hard to think that anyone could describe in that way the language invented by Dr. Zamenhof to be a tool to help in bridging the doubts caused by ignorance of other peoples and to help to reconcile. But, strange as it may seem, that is the title of Field Manual 30-101-1 issued by Headquarters, Department of the Army, Washington 25,DC. February 1962. The Foreword explains in more detail.

"Esperanto has been adopted as the official language of Aggressor, the Manoeuvre Enemy. It may be modified by local usage or supplanted by the language of the local area/ The primary benefit of using a different language is its contribution to the realistic intelligence play in training exercises. Where personnel are available with a proficiency in a foreign language, intelligence documents may be prepared in that particular language and injected into the exercise. This Esperanto Supplement has been compiled for use where trained linguists are not available."

NOVJARA INTERNACIA FESTIVALO EN GERMANIO

Mi menciis antaŭe ĉi tiu bone organizitan internacian feriadon, do, jen sekvas raporton pri la antaŭlasta por doni al vi la guston de ĉi tiuj ĉiu-jare eventoj.

20-jara I.F. festis kun rekoro. Jouko

Lindstedt – Finnlando

Internacia Festivalo, fama E-renkontiĝo precipe por familioj kaj mezaĝuloj, kolektis la rekordan nombron de 201 diverslandaj aliĝintoj en la germana urbo Munster (27 dec. – 3 jan.).

Ĉi-jarŝanĝe pasis 20 jaroj de post la unua IF, kiu origine naskiĝis kiel aranĝo paralela kun la renomaj Internaciaj Seminarioj de Germana E-Junularo, sed baldaŭ mem-stariĝis kiel tradicia renkontiĝo por ĉiuj ne plu tute junaj. Multaj el la partoprenantoj revenas al IF jaron post jaro.

La kadra temo de ĉi tiu IF estis “Eŭro-po”: prelegoj prezentis diversajn (“po-ajn”) alirojn ekonomiajn, kulturajn, politikajn kaj ide-historiajn al la eŭropa unuiĝado. Danke al la propra subtena fonduso de IF, povis partopreni ankaŭ pluraj esperantistoj el ekster Eŭropa Unio, precipe el Rusujo.

La semajno enhavis multajn kulturajn programerojn (inter kiuj elstaris la koncerto de la kantgrupo Akordo), kursojn kaj ekskursojn, tablotenisan turniron, romantikan dancejon kaj diskodancejon, kaj apartan infanan programon. Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino aranĝis studsesion dum la semajno.

La kulmino estis kompreneble la Silvestra Balo, dum la partoprenantoj akceptis la novan jaron per ĝojaj tosto kaj gaja dancado. Sed la vervo ne elĉerpiĝis per tio, ĉar ankaŭ la sekvaj vesperoj (israela kaj internacia) enhavis spektindajn programerojn.

Kiel unuafaj partoprenantoj, nia familio (ni gepatroj kaj du malgrandaj infanoj) estis impresita de la varma kaj facila etoso de la festivalo: neniurigardis la multajn ĉeestantajn infanojn kiel ĝenon, kaj la tradicia E-bierejo “Knajpo” iĝis la ŝatata babilejo de partoprenantoj plej diversaĝaj, en plej diversaj horoj de la tagnokto.

Por detaloj de la 18-aj Internacia Festival 27 dec 2001 – 3 jan 2002 en Magdeburg (proksima al Hannover kaj facile atingeble de Britio, petu EAB oficejo por flugfolio (sendu S.A.E-n)

ESPERANTO SURPRIZO EN MALTA INSULARO!

Por eskapi la Britan vintron kaj resti sub la suno ni feriadis dum tri semajnojn en Malta.

Ĉe la sud-Eŭropa limo tiu ĉi insularo spertis jarcentojn de enmigrintoj, komercistoj kaj militantaj invadantoj. Romanianoj, Araboj, Normanoj, Hispanoj, Turkoj, la Kavaliroj de la Sankta Johano kaj la Britoj ĉiuj vice regardis. Nuntempe la insularo restas pace sur malhela blua Mediteranea maro, kaj bonvenigas la multajn turistojn kiuj vizitas.

Bedaŭrinde, ne ĝis nia tria semajno ni petis de la Valletta Turista Oficejo ĉu estas Esperanto grupo. Oficistino klarigis kien ĝi estas kaj kiam la grupo renkontiĝas. La loko estis facile trovebla ĉar la ĉefurbo Valletta estis konstruata laŭ simpla krada sistemo de la dekseksaj jarcentaj Kavaliroj de Sankta Johano sur promontoro inter du naturaj havenoj. La urbo inkluzivas nevenkeblajn (impregnable) fortikaĵojn, grandiozajn konstruaĵojn, palacojn kaj preĝejojn. Kavaliro Walter Scott, kiam li vizitis, proklamis “A splendid town, quite like a dream”.

En unu al la malnovaj ĉefstratoj de altaj mallarĝoj domoj kaj malgrandaj butiketoj, ni ekvidis modernan blankan tabuleton sur antikva pordo, kiu montris verdokolorita stelo kaj la nomo “Malta Esperanto-Societo”. En la leterkesto ni metis noton kun la nomo de nia hotelo. Venonttage ni ĝojis ricevi telefonvokon al nia hotelo en Bugibba de la sekraterio John Vella Bondin.

La posta tago mezjuna membro, Bruno Horne, telefonis. Li aranĝis renkontiĝon en Valletta, kune kun edziĝinta paro: Finna viro kaj Japanino, ambaŭ Esperantistoj. Bruno gvidis nin promenante al malnova ĝardeno sur kvin niveloj ĉe la bazo de altaj bastionmuroj. La ĝardeno estis planita kaj plantita de Angla virino antaŭ la unua mondmilito. Soldatoj skulptis regimentajn insignojn sur la rockaj muroj. Bruno gvidis nin laŭ Msida Jaktostacio, rigardante antikvajn kaj novajn modestajn kaj luksajn boatojn. Subite, ni haltis. Tie, en ĝardeneto, sur alta soklo, estis busto de Dr. Zamenhof! Sur la antaŭa parto de la soklo estis skulptita stelo kaj kolombo kun la dato – 1990.

Vere Esperanto surprizo en Malta! Post tri tagoj ni estis ĉeĥejme en Barrow, kun feliĉaj memoraĵoj pro niaj spertoj. Espereble ni denove reiros ĉar la Malta Societo organizas dujare internacian semajnon dum septembro. Malta Esperanto Societo 86 Old Bakery Street, Valletta, Malta. (P.O. Box 42 Valletta)

Jane and Brian Rayner
Barrow, Cumbria.

Deaths of our members

Here follows a list of our members who have died during the past 12 months. The list unfortunately is a long one because our average age has increased in recent years. In future it will be the practice to mention in each issue of EAB-Update the names of those members whose names have been brought to the attention of the editor. If you hear of any deaths do please inform us. Publishing the names helps to stop correspondence which might distress the surviving relatives.

Daniela Bauza-Phillips	Hastings	Jean Bomford	Cornwall
Sheila Boothman	Kirkby Lonsdale	Miss Brazire	Birmingham
K.W. Brooks	Swansea	Lou Brooks	London
Thomas Cardwell	Salisbury	A.R. Cartwright	Norwich
Frazer Dunbar	Ipswich	B.S.H. Fletcher	Cambridge
Mr Hinton	Oxford	Mr Holland	Harrowgate
Hariet Huray	Shaftesbury	Mr Johnson	Bishops Stortford
Miss Larrad	Colwyn Bay	Frank Maitland	Kent
Rev. Hugh Martin	Birmingham	Douglas Norman	London
Christine Pearson	Frodsham	Ronald Rice	Bedford
Alan Smallay	Leeds	Betty Stephenson	Derby
Mr Taylor	Kelty	Margeret Trethowan	Cirencester
Mr Woodward	Beaconsfield		

Lou Brooks (1913-2001)

Kiu ne konis Lou Brooks havas truon en la vivo.

Li estis nenormala homo al kiu la Esperantistaro ŝuldas multe. Kiam li mortis, rezulte de akcidento en granda aĝo, liaj amikoj kaj familianoj okazigis kunvenon por festeni lin kaj interŝanĝi memorojn pri tiu kare memorata viro.

Ĉeestis preskaŭ 50 personoj, inter kiuj estis kvin Esperantistoj. Vice lernintoj en lia lernejo, familiaj membroj diversaĝaj, amikoj el liaj teatrumaj tagoj, samprofesiuloj, kaj aliaj kiujn li diversmaniere impresis per sia personaj trajtoj, starigis por paroli tributojn al lia vivo. Preskaŭ ĉiu aludis al lia rilato al Esperanto. Sed la tributo legita de la filino, Ingrid, estis tiel kortuŝa, ke ni ne povus fari pli bone ol citi tion. Jene:

“Dad, He was a great one for entrances and exits. Always a performer, he was a man of many parts. For me his best role was that of being my Dad. I shall always be grateful for what he gave me. Above all, he showed me how much it is possible to love life, when you throw yourself into things with the kind of enthusiasm he had – for people, for beliefs, for life itself.

He was a very public-spirited man. He took on innumerable causes which others might have scorned as being not immediately fruitful. That was never the point – the point was the taking part, with love.

When he retired after teaching for 30 years at the same school, it was the Esperanto movement to which he devoted most of his time, until he was well over 80. As anyone who has been buttonholed by him on that particular topic – and most of us have been! – will know. When he was 80 he took a group of players to Spain to perform his beloved Ayckbourn to an Esperanto Congress. I shall always treasure the tape of him singing the Major General's song from “The Pirates of Penzance” in Esperanto.

He was, despite all this activity outside the home, also a family man. His long marriage to my Swedish mother was profoundly happy. He always relied greatly on her support, but when my Mum had a series of strokes he turned his hand to the domestic tasks which had been her domain, and looked after her with a gently devotion.

We took him on holiday to the Jura after my Mum died. One day we went on a walk on a mountain path. On the way down he started running. Running! I called out to him to slow down, just as he went flying head over heels,

(Continued on page 12)

Calendar of Events.

June 2 to 4. French Esperanto Congress, Limoges.

July 6 to 15. 37th Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37). This famous, large scale holiday survives the fall of the Soviet Union. This year it takes place in Kaunas, Lithuania. A leaflet is available from EAB office.

July 14-21. 15a Ekumena Kongreso, (54a de IKUE & 51a de KELI) Zagreb. Details from Marija Belosevich, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb.

July 21-28 86th World Esperanto Congress, Zagreb, Croatia. Ask office for leaflet.

July 29 – Aug. 5. 57th International Youth Congress, Strasbourg, France.

August 11 to 17 41st Esperanto Summer School at Wedgwood Memorial College.

(see article page 14).

September 1-10. 35th International Holiday. In Spa town of Kudowa Zdroj in south west Poland. Cost £100. Suitable for beginners. See the EAB holiday leaflet.

September 22-23. Scottish Study Weekend at Dunblane. 2001. Contact Jean Bisset.

November 13th Nordfranca Europa Esperanto-Rendevuo at Morbecque. (a group from Eastern region usually go to this. There may be some spare places.

December 27-January 3 or 4. 18th Internacia Festivalo. Magdeburg, Germany. A very good New year event. Ask EAB office for more details.

NEW SCIENTIST.

Esperanto strikes back! Following the claim in *New Scientist's* Letters pages that there are now more fluent Klingon speakers than Esperanto Speakers (17 march, p62), Fox Lorber Films tells us it is releasing **Incubus**. The only feature film ever made in Esperanto (*not true, ANGOROJ was made earlier and some video copies exist and EAB office has a 16mm copy—Editor*) on video and DVD at the beginning of May 2001. Directed by Leslie Stevens, who made the 'Outer Limits' TV series, and starring William Shatner, who went on to play 'Star Trek's' Captain Kirk, **Incubus** was made in 1965-and promptly disappeared without trace. The storyline (*see next column*)

Lou Brooks. (Continued from page 11) rolling over and over down the steep slope. He came to rest against a large rock, fortunately unscathed. Predictably, his response was a rueful laugh." Oni invitis ĉeestantajn Esperantistojn kontribui, kaj ni iomete rakontis pri lia laboro en BEA oficejo, en la Londona Klubo. Pri lia senĉesa laboro en diversaj oficejoj, lia laboro en E.T.A. lia riparado al la muroj kaj elektro en la oficejo, lia reĝisorado de diversaj distraj vesperoj.... Kaj multe plu.

Mankas al ni nun eksterordinara "normala homo" multtalenta.

* * * * *

From The Media.

DAILY MAIL. 5 April 2001.

Question. If a chart was compiled of the most common language in the world, based on mother tongue only, would English still be in the top ten?

Answer. Whilst English is generally regarded as the Earth's *lingua-franca*, the top ten of the most commonly spoken languages has English (514 million speakers) in second place after Mandarin Chinese (1,075 million speakers). In third place is Hindustani (497 million), followed by Spanish (425 million), Russian (275 million), Arabic (256 million), Bengali (215 million), Portuguese (194 million), Malay-Indonesian (176 million, and in tenth place French (129 million). However, if mother tongue only becomes the criterion, English (347 million) falls to fourth place, following Mandarin Chinese (885 million) in first place, Hindustani (375 million), and Spanish (358 million).

* * * * *

(from previous column)

revolves round a man who battles the forces of evil on a strange island inhabited by demons and spirits. And it is all in black and white.

For the benefit of people whose second language is Klingon, not Esperanto, the film will be given English subtitles.

* * * * *

Ĉiam sama

Li: Mi sonĝis pri vi lastnokte, karulino.
Ŝi: Ho, karulo, kian vestaĵon mi surhavis?

BONVOLU ESPERANTIGI

Jen la mozaiko de BV Esperantigi 4.

En la somero de 1606 la vizito al Anglujo de Reĝo Christian [Kristjan] IV de Danlando, frato de Reĝino Anne [An], instigis la tutan Kortegon ĵeti sin en ekstravaganca drinkadon. Kavaliro John Harrington [Johano Harington] verkis groteskan raporton pri festa dram-spektaklo kiu sekvis bankedon donitan de la Grafido de Salisbury [Solzbri] honore de la Reĝo. La sinjorino kiun oni elektis por la ĉefa rolo, la Reĝino de Ŝeba, tiom ebriis, ke kiam alvenis la momento por prezenti al Reĝo Christian riĉajn oferojn, ŝi falis sur lin, verŝante siajn donacojn sur liajn genuojn. Reĝo Christian mem sin montris nekababla rekte stari kaj oni devis konduki lin al dormoĉambro, kie li kolapsis en ebria stuporo. La spektaklo daŭris dum lia foresto, sed la ceteraj ludantoj apenaŭ pli bone statis, ĉar iuj pro drinko senparoliĝis, aliaj "vomis kaj disvomis", kaj almenaŭ unu implikiĝis en nedeca brumalpaco.

Notes

"Court": "kortegon" or "kortegaron". ("Kortano" does not have the precise sense of a courtier.) Given a free choice between a simpler and a more complex Esperanto form, my own preference is generally for the shorter and simpler unless there is a special advantage in opting for the more complex.

"Drinking bout": I enjoyed GB's "bakhanalion" but in the end felt that the English phrase was more prosaic and called for a less unusual Esperanto equivalent.

"Masque": in Jacobean times this was an elaborate and extravagant piece of theatre, often with pageant and lots of special effects, generally staged to celebrate some special event in a noble or royal household. AK proposed "maskdramo", a drama where actors wear masks, but a masque need not involve the use of masks (and, contrariwise, ancient Greek tragedy – which could scarcely be further from the character of a Jacobean masque – usually did). Fulcher & Long's dictionary has "drama spektaklo": I do not think that, on its own, this quite conveys the luxurious and celebratory character of a masque, so I have added the adjective "festa".

"Lady": "sinjorino" or "damo".

"Sheba": elsewhere I have kept to the English forms of names, with Esperanto transliterations in brackets – my own normal practice. One could equally just use Esperanto versions of all the names. It matters little which approach one adopts, though it is best to be consistent. "Sheba", however, is an English rendition of an Old Testament placename, for which Zamenhof himself provided the Esperanto version "Ŝeba" in his translation of the Bible, and I have followed Zamenhof.

"Spilling": GB suggested "disŝutante", which has the flavour of "scattering in all directions". As all the items seem to have ended up in one place, the royal lap, I prefer "verŝante".

"Brawl": GB proposed "interpugnado" – a possible solution, although a brawl need not involve fisticuffs, so I have opted for AK's more general "brumalpaco".

Premieto to Gershon Blaskowitz de Londono (libro – 'Vortoj de Andreo Cseh).

Bonvolu Esperantigi 6

Jen la teksto por la sesa konkurso. Bonvolu sendi solvojn antaŭ la 20an de julio al Michael Cayley, 13 Grove Road, East Molesey, Surrey KT8 9JS.

The great Muscari, most original of the young Tuscan poets, walked swiftly into his favourite restaurant, which overlooked the Mediterranean, was covered by an awning and fenced by little lemon and orange trees. Waiters in white aprons were already laying out on white tables the insignia of an early and elegant lunch; and this seemed to increase a satisfaction that already touched the top of swagger. Muscari had an eagle nose like Dante; his hair and neckerchief were dark and flowing; he carried a black cloak, and might almost have carried a black mask, so much did he bear with him a sort of Venetian melodrama. He acted as if a troubadour had still a definite social office, like a bishop. He went as near as his century permitted to walking the world literally like Don Juan, with rapier and guitar.

For he never travelled without a case of swords, with which he had fought many brilliant duels, or without a corresponding case for his mandolin, with which he had actually serenaded Miss Ethel Harrogate, the highly-conventional daughter of a Yorkshire banker on a holiday.

[G K Chesterton, "The Paradise of Thieves"]

Esperanto Lincolnshire is the name of a new web site. Every month a prize is given for the most popular web pages on the **This is Lincolnshire** site. The winning pages also get additional publicity. Why not visit this site, cast your vote and at the same time give **Esperanto** some more publicity? The site address is beehive.thisislincolnshire.co.uk/esperanto/

41a Esperanto Somerlernejo: Sabato 11a – vendredo 17a de aŭgusto, 2001

Bonveno vin atendas!

La Barlaston-a somerlernejo eniras sian 41-an jaron en 2001. Memevidente, en la daŭro de kvar jardekoj multo ŝanĝiĝis, tamen la spirito de la pioniraj sesioj restas (pri kiuj, parenteze, oni povas legi en la lastatempe aperinta eseero *Rubenaj refrenoj* bazita sur prelegoj okazigataj en 2000 honore al 40 sinsekvaj somerlernejoj en Barlaston).

Tiu ĉi spirito kuŝas en la aparta etoso ĉe Wedgwood Memorial College: spirito funde Esperanta, forte Esperanta; spirito, kiu insiste persiste kreas pure Esperantan mondeton, tiel ke partoprenantoj, kiuj dum la unuaj horoj en Barlaston nur hezite balbutas, havas la eblecon fine de la semajno memfide sin esprimi en la internacia lingvo.

Tio signifas, ke staĝanoj en Barlaston, kiuj preferas uzi la anglan – kaj ili malmultas – verdire ne estas tre bonvenaj. Tiuj, kiuj partoprenas la somerlernejojn, ĝojas, ke dum tuta semajno ili povas liberiĝi de la angla; ke ili uzas Esperanton ne nur en la klasĉambro – ekz. diskutante aktualajn temojn – sed ankaŭ en la manĝejo, en la arboriĉaj ĝardenoj ĉirkaŭ Wedgwood Memorial College, vespere en la vilaĝa drinkejo, aŭ ekskursante al loka vidindaĵo, ekz. ceramikejo, muzeo aŭ kastelo. Alivorte: oni plene mergiĝas en lingvo kaj kulturo Esperantaj, tiom ke krokodiloj, malhelpante al 'seriozaj' Esperantistoj, fariĝas en Barlaston bestoj minacataj.

Emfazata en Barlaston estas la ĉiutaga, parolata lingvo, kiun oni aŭdas pere de prelegoj de spertaj Esperantistoj, kaj uzas kun aliaj staĝanoj. Tradicia karakterizaĵo de la somerlernejoj estas la ĉeesto ne nur de eksterlandaj partoprenantoj sed ankaŭ de eminenta, eksterlanda gastpreleganto (kiu ne nur prelegas sed ankaŭ gvidas konversaciajn kaj aliajn sesiojn). Denove, pro la partoprenado de eksterlandanoj, estas tre malĝentile paroli la anglan: alia kialo por forigi krokodilojn!

Ne nepras tamen esti sperta Esperantisto por partopreni somerlernejon (espereble, partopreninte, oni fariĝos spertulo!). Kvankam la staĝoj ne celas komencantojn (por ili estas aranĝataj aliaj, pli konvenaj studrondoj en Barlaston), tiuj, kiuj jam studis ĉefelementojn de la Esperanta gramatiko sed al kiuj ankoraŭ mankas memfido paroli kaj sin esprimi, profitos de la semajno ĉe Wedgwood Memorial College. Tiaj progresantoj eniras apartan grupon en Barlaston kaj okupiĝas ja pri Esperantaj tekstoj kaj aliaj taskoj sed ilin pritraktas ĉefe de gramatika vidpunkto: tiel ili akiras sperton kaj memfidon por 'naĝi' en la vasta Esperanta oceano. Aliflanke progresintoj – tiuj, kiuj jam bone regas la lingvon sed kiuj volas 'freŝigi' siajn lingvajn konojn – konsideras gramatikajn nuancojn de la lingvo en la kunteksto tamen de artikoloj politika, medioprotekta, naturscienca aŭ literatura ĉerpitaj ĝenerale el la revuo *Monato*.

Do oni laboras kaj oni ankaŭ sin amuzas, ĉu en la drinkejo, ĉu dum la distra vespero, aŭ ĉu simple en la ĉeesto de aliaj Esperantistoj. La sukceso de la Barlaston-aj somerlernejoj montriĝas en la fakto, ke jaron post jaro revenas ja 'fidelaj' studentoj, al kiuj plaĉas la unika, (ĉer)amika etoso de Wedgwood Memorial College. Tamen ankaŭ novaj vizaĝoj trovas bonvenon en Barlaston: do, se vi neniam partoprenis unu el la famaj somerlernejoj, kaj se vi volas profundiĝi dum tuta semajno en Esperanto (kaj, tro manĝinte, iom dikiĝi . . .), tuj aliĝu por mendi vian lokon. Bonveno vin atendas en Barlaston!

Paul Gubbins


Trainseurope Ltd. 146 Forest Hill Road, London SE23 3QR. Tel: 0208 699 3654.

This company specialise in helping individuals or groups to reach European destinations by train. They have special offers from time to time, especially for groups. If you and friends are thinking of going to some Esperanto event in Europe why not ask them for a price? (Incidentally once, whilst on holiday in Bulgaria I, without thinking, spoke of "going to Europe". "Oh" said one of the Bulgarian Esperantists, with an innocent air, "in which continent then is Britain?" Eric Walker).

Bona ideo

Patro: Vi aĉetis por la knabo tamburon! Li ja certe malhelpos min, kiam mi laboras!

Patrino: Jes, vere...., do li ludos per ĝi nur post la taĝmanĝo, kiam vi siestas.



(R)= Uzu nur la radikon

HORIZONTALALE

- 1 Loko por dormi dum vojaĝo aŭ ferio. (5) (R)
- 4 Uzi cigaredon aŭ pipon. (3) (R)
- 6 Tri- -e dudek unu estas sep. (2)
- 7 Oni metas piedonon ĝin. (2) (R)
- 8 Ŝiri aŭ vundi per la dentoj. (5)
- 10 Palpi. (3) (R)
- 12 Malofta gaso, uzara por reklama lumigado. (4) (R)
- 13 Per ĝi, oni povas pensi. (4) (R)
- 15 Judgermana lingvo. (4) (R)
- 17 Enprofundiĝi en pensado. (6)
- 19 Interjekcio, kiu esprimas plendon pro malfeliĉo. (2)
- 20 Daŭre marteli egalas al martel - - - . (3)
- 21 Drato aŭ stangeto uzata por ricevi radiosignalojn. (5) (R)
- 23 Konjunkcio. (2)
- 24 Granda sovaĝa besto kun densa felo. (3) (R)
- 25 Esprimi doloran senton per plendaj sonoj. (3) (R)
- 26 Nomo de neesperanta litero 'x'. (3) (R)

VERTIKALE

- 1 Religia kanto. (4) (R)
- 2 Ataki per submara, cigarforma armilo. (7)
- 3 Io, kio devas esti trovata estas trov - - - a. (3)
- 4 Du el ili egalas al dudek kvar koloroj. (5)
- 5 Insekto kun flugiloj. (3) (R)
- 9 Starigi ion en la destinita loko. (6) (R)
- 11 Ĝi konsistas el planedoj, astroj, asterojdoj, galaksioj. (7) (R)
- 13 Mielvino. (3) (R)
- 14 Plurala ronomo de la unua persono. (2)
- 16 Koncentrita. (4) (R)
- 17 Maĉi kaj gluti solidajn nutraĵojn. (4) (R)
- 18 Sufikso, kiu montras homon, kiu povas naŝki idojn. (2)
- 22 Peco de teksaĵo uzata por iu celo. (3) (R)

SOLVOJ (Issue 12)

Horizontale.

- 1. Nest 3. Futo 6. Suno 7. Gant 9. Mulo 11. Ĝemi 12. Or 14. Se 16. Parto 18. Aper 19. Ekin 21. Kel 22. Aleo 23. Il 24. On

Vertikale.

- 1. Nigr 2. Song 3. Fumis 4. Unu 5. Tolo 8. Teatr 10. Orgen 13. Kapel 15. Enket 16. Paki 17. Rel 19. El 10. Io 22. An

Superstiĉa

A: Ĉu vi vere kredas, ke malfeliĉo rezultigas, se oni edziĝas en vendredo?

B: Kompreneble, kial vi atendas, ke vendredo faru escepton de la regulo?

In the shadow of Mount Everest!

Once again the Nepalese Esperanto-Asocio plans the 4th International Himalayan Meeting to occur 26th February to 8th march 2002. In the three previous similar events took part over 150 Esperants. Further details from Nepal Esperanto Association, G.P.O. Box. 10518, Katmandu, Nepal. Quicker and cheaper is to email them at nrb@ntc.net.np

EAB-UPDATE

Redaktoro

Eric Walker

Downham Reach Cottage
Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Tel: 01473 717 088

Fakso: 01473 274 531

Retpoŝto: eabupdate@esperanto.org

OFFICIAL ANNOUNCEMENTS

New Members.

Steffan ap Dafydd	Port Talbot
Mr. M. Cosgrove	Doncaster.
Mr. J. Loughran	North London
Sharon Savage	Cranfield, Beds.
Mr. A.J. Zdan-Michajlowicz	North London

HOLIDAY SUGGESTIONS

The World Esperanto Association (UEA) has an **open day** at it's head office in Rotterdam twice a year. The next one is on **Saturday 24th November**. It is always an enjoyable day with prominent speakers throughout the day. Refreshments are continually available. You can buy books from the largest Esperanto bookshop in the world (and get a 10% discount) and visit the Library. There are usually up to 100 visitors on the open day and you are likely to meet people you already know from other countries or whose names you know from reading Esperanto magazines.

There is a proposal to organise a group visit this year. Groups could set off from London and Hull, going either by National Express coach, by train or by car. Costs are likely to be from £40 to £60. A detailed leaflet will be available from the office by July 1st. Send in a stamped addressed envelope if you would like a copy.

* * * * *

A one day '**Prelego kaj Debato**' on **ESPERANTO KAJ IDEOLOGIOJ** will take place in Gent, Belgium on Saturday 20th October. Speakers will include Kresimir Barkovich (secretary of S.A.T.), Detlev Blanke (for many years secretary of the former East German E. Association, Renato Corsetti (liaison between U.E.A. and national associations) and others. Please send an s.a.e. to the office for a leaflet.

KASTELO GRESILLON

A leaflet with details of this year's weekly courses, from 7th July to 18th August, is now available from the office. Please send s. a.e. for a copy.

* * * * *

Once again, with the kind permission of the publishers of

HEROLDO DE ESPERANTO

We are able to provide, as a supplement to this issue of EAB-Update, the annual list of Esperanto holidays and events, most of them taking place during the summer. A quick count shows that in the four month summer period, there are 128 events covering 24 countries. This does not include the many many events, details of which, have not been sent to the publishers of the annual list. Myself, I can think of several events, and so there must be dozens more. This richness in events, in book publishing, mark out Esperanto as the most successful of international auxiliary languages. There are several of these which stress that they have advantages over Esperanto, but none of them can show anything like the practical uses to which Esperanto is put each and every day.

* * * * *

Late item. Li-yamin from China, would like a penfriend to correspond by email. Please write to him at li-yamin@163. Net (in these days of computers, can anyone update the word 'penfriend'?)

Embarasa Tasko

La solvo de ĉi tiu enigmo, troviĝante sur paĝo 3 estasTri!

NB! Copy date for the next issue is 10th August.